Similan esploron neniam iu ajn poste entreprenis. Vortojn oni nombris multfoje kaj aperis diversaj esploroj – la plej lasta estas tiu de d-rino *Sabine Fiedler* en 2014, kiu prezentas la vortoftecon de Esperanto el skribitaj tekstoj je plurmiliono korpuso ([www.univerlag-leipzig.de/catalog/article/1593-Frequency\\_Dictionary\\_Esperanto](http://www.univerlag-leipzig.de/catalog/article/1593-Frequency_Dictionary_Esperanto)). Sed fine en 2015 sinjoro *Raymond Gerard* el Belgio (*Remuŝ*) evoluigis softvaron kiu bonege, kun tre minimuma erarkvanto ebligis aŭtomate nombri morfemojn komputile en esperantaj tekstoj. Tio ebligis realigi esplorojn kompareblajn kun tiu mia el 1982. Kaj post pluraj komparoj ene de diversaj tekstoj unue nia duopo akiris bazan morfemliston, kiu ekestis el kombino de mia listo kaj frekvenclistoj de porinfanaj similgrandaj libroj kiel ekz. la romaneto de *Exupery*, »La Eta Princo«, do tekstoj skribitaj. Tiun bazan morfemliston ni publikigis en la aŭgusta numero de *Eŭropa Bulteno* ([www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=439&filename=eb-151-2015-08.pdf](http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=439&filename=eb-151-2015-08.pdf)) kaj ĝi konsistas el 445 morfemoj. Tamen por atingi la finan bazan liston, ni decidis esplori enorman skribitan tekstaron kaj kompari ĝiajn rezultojn kun ĉi tiu baza listo. Sinjoro Remuŝ elektis 49 prozajn librojn kun 2.017.652 da vortoj kaj komputile analizis la morfemojn en tiu tekstaro. Tiu materialo konsistis el 16.653 diversaj morfemoj (bazaj vorteroj), sed tre simile kiel en niaj antaŭaj kaj mia esploro 95% de la tuta korpuso estis kovritaj de nur 412 plej oftaj morfemoj kaj ĉiuj aliaj pli ol 16.000 malpli ofte uzataj morfemoj kovris nur 5% de la korpuso.

Troviĝis iom da diferenco, ĉar inter tiuj proksimume 450 plej oftaj morfemoj de la grandega skribita tekstaro troviĝis 94 eroj, kiuj ne troviĝas en la baza listo. Sed el inter ili 68 jam enestas en

la Zagrebmetoda lernolibro. Sekve ni nun povas aŭtoritate kaj baze de vere detalaj esploroj fari la jenan konkludon:

Konsiderante ĉefe la bezonon de parola uzo ekzistas baza morfemlisto kovranta 95% de la tekstaro necesa, kiun ni plu konsideras **tre elementa Baza Listo** por krei kiun ajn lernolibron por komencantoj kaj ĝi estu rekomendaĵo por ĉiuj kreantoj de novaj lerniloj. Jen ĝi:

*a ad afer ag ajn akcept aktiv akv al ali almenaŭ alt am amas amik an ankaŭ ankoraŭ anstataŭ ant antaŭ apart aper ar aranĝ art as aspekt at atent atent ating aĉ aĉet aj aŭ aŭd aŭskult baldaŭ bedaŭr bel bezon bon cel cent centr cert ĉambro ĉar ĉe ĉef ĉi ĉiam ĉirkaŭ ĉiu ĉu da dank daŭr de decid dek dekstr demand dev dezir dimanĉ dir dis divers do dom don dorm du dum e ebl ec edz eg ej ek ekskurs ekster ekzempl ekzist el elekt em en er esper est estr et eĉ eŭrop facil fakt fal famili far fart feliĉ ferm fin flank foj for forges form fort frat fru funkci gajn ge german grand grav grup gvid ĝeneral ĝi ĝis ĝoj ĝust halt hav hejm help hieraŭ histori hodiaŭ hom hor i ia iam ide ie ig ili imag in ind infan inform instru int inter interes io iom ir is ist it ital iu iĝ j ja jam jar je jen jes jun juĝ jaŭd kaj kant kap kapabl kapt kar kaŝ ke kelk kia kial kiam kie kiel kies kio kiom kiu klar komenc kompren komput kon koncern konsent konsist kontraŭ korp kost kovr kred kresk krom kuir kultur kun kur kutim kvankam kvar kvazaŭ kvin la labor land las last laŭ leg lern leter li liber libr lig lingv lok long loĝ lud lum lund mal man manier mank manĝ mar mard maten mem memor merkred met mez mi mil milion minut mir mon monat mond montr morgaŭ mort mov mult n naci nask naŭ ne neces nek ni nokt nom nov nu numer nun nur o oft ok okaz okcident okul okup ol on oni oni opini ordinari organiz os pag pardon parol part pas patr paŝ pens per perd person pet pied plan plaĉ plej plen pli plor plu plur por port post postul pov poŝ pren preskaŭ pret prezent prezid pri pro problem produkt profesia proksima propon propr prov publik pur radi rajt rakont rapid raport re reg regul renkont respond rest ret ret ricevi rid rigard rilat rimark riĉ romp*

*sabat salut sam san sat saĝ sci scienc se sed sekv  
semajn sen send sent sep serĉ ses si sid signif  
silent simil simpl sinjor sistem skrib sol spert star  
strat sub sufiĉ sukces super supr sur ŝajn ŝanĝ  
ŝat ŝi ŝir tabl tag tamen tekst tem temp ten tia tial  
tiam tie tiel tim tio tiom tiu tra trans tre tri trink  
tro trov tuj tut u uj ul um universitat unu urb us  
uson util uz valor varm vast ven vend vendred  
ver verk vesper veter vetur vi vid vir viv vizit voj  
vojaĝ vol vort voĉ zorg*

Tiuj kiuj volas, ke ilia lernolibro enhavu ankaŭ morfemojn ofte uzatajn en skribaj tekstoj, aldonu al ĝi la jenan liston:

*arb, sid, kri, seĝ, kap, ter, ĝoj, kor, lev, knab,  
kuŝ, kur, ŝip, pord, vizaĝ, di, fil, turn, moment,  
vest, apud, jet, terur, tir, bril, flug, baldaŭ, id,  
serv, trankvil, strang, flor, kamp, sun, mont,  
ruĝ, subit, salt, lit, profund, son, konduk, kuraĝ,  
gaj, fajr, ordon, or, anim, nigr, efektiv, preĝ,  
best, blank, permes, ĉeval, brak, hund, bat,  
gard, vent, prem, bru, laŭt, bird, ambaŭ, frap,  
vok, ŝton, milit, kompat, brul, ĉiel, bord, kaŭz,*

*fenestr, pend, batal, buŝ, etend, kontent, trem,  
pec, hel, aĝ, ceter, river, kolor, lign, sek, koler,  
popol, fiŝ, sankt, intenc.*

Ĉi tiuj pliaj 94 morfemoj do estu aldonitaj aŭ uzataj en pli supera kurso post la baza. Sed la plej simpla tuja solvo estas por la baza kurso uzi la jam ekzistantan lernolibron de la Zagreba Metodo en kiu enestas ĉiuj morfemoj de la Baza Listo kaj 68 el la aldonajoj, do preskaŭ ĉio el ambaŭ listoj.

Kreantoj de daŭrigaj kursoj (A2 kaj B) principe povas decidi uzi kiujn ajn morfemojn, ĉar en tiuj niveloj ne plu tiom gravas miksi la nivelojn, sed ĉiu el ili povas uzi la frekvencaron de Remuŝ faritan el 2 milionoj da vortoj kun sinsekva ofteclisto de 16.653 morfemoj kaj daŭrigi laŭ la ofteco en tiu listo (ekzemple preni la postajn 500 morfemojn laŭ ofteco. Ĝin vi trovas ĉe: [www.remush.be/teksto/](http://www.remush.be/teksto/) klakante sube al *oftecoj.ods* kaj rigardante la kolumnon E.

*Zlatko Tišljar*

## Lisää kevyitä kosketuksia kieliharrastukseen

Kiitos, Jorma, artikkelistasi (Leĝeraj eroj pri lingva hobiado, Esperantolehti 5/2015, toim.). Neljän käännöskielen tutkielma Kiven romaanista Seitsemän veljestä on mielenkiintoinen juttu. Hämmästyttävintä on, että neljäntenä oli sinulle aivan vieras eestin kieli.

Mieleeni muistui oma kokeiluni vieraillla kielillä, vaikka sitä ei voi verrata edellä mainittuun, kun kysymyksessä oli aina yksi kieli kerrallaan. Ihastuin kanadalaisen kirjailijan Mazo de la Rochen Jalna-sarjaan. Opiskeltuaani muutaman vuoden englantia kahlasin kaikki osat läpi, vaikka en jokaista sanaa ymmärtänytkään. Esperanto auttoi valtavasti ranskan kielen opiskelussa. Neljäntenä vuotena rohkenin tarttua Françoise Saganin teokseen Bonjour tristesse (Tervetuloa ikävä). En katsonut sanakirjaan, jos ymmärsin lausen sisällön. Surullinen, mutta hieno teos. Luen sen pian uudelleen.

Esperantoyhdistyksemme lukupiirissä luimme eräänä vuonna Eduard Vilden teoksen Lak-tisto de Mäeküla. Se on rehevä kuvaus eestiläisestä maalaiselämästä, herraskartanon maitomiehen perheestä. Kannoin muassani sekä suomen- että eestinkielistä kirjaa ja vertailin tekstejä. Olin seurannut radiosta kielikurssia Eesti ring ja luulen, että suomennoksessa on pari virhettä. Eestin kielessä löuna tarkoittaa etelää, mutta se oli käännetty lounaaksi. Toinen kohta on lause, jossa isä näyttää lapsilleen varjokuvia. Lause ”ma säitin lambi parajasse kohta” on suomennettu ”laitan lampaan parhaaseen paikkaan”. Minusta kysymys on lampusta, ei lampaasta. No, eestinkielinen henkilö osaisi varmaan asian ratkaista. Olkoon miten onkin: kielet ovat kiehtovia.

*Anna-Liisa Ali-Simola*



*Forpasis  
Carola Antskog*



## El la Panteono de edukado.net

La lasta tago de la jaro 2015 iĝis la lasta tago de la vivo de *Carola Antskog* pro grava malsano.

Carola eklernis Esperanton kune kun sia filino *Anna Ritamäki-Sjöstrand* en la 80-aj jaroj. La nepino, filino de Anna, konatiĝis kun la internacia lingvo kune kun la avino kaj patrino kaj jam partoprenis la Universalan Kongreson en Rejkjaviko kaj Lillo.

Carola Antskog profesie estis instruistino, kaj ŝi estis membro de ELFI, Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj. Ŝi estis elektita ĝia prezidanto en 2001–2008. Dum tiu tempo ŝi aranĝis trifoje en 2004–2006 vojaĝojn de gimnazianoj al Strasburgo dum t.n. Euroscola-tago en la ejo de la Eŭropa Parlamento. Tie la finna grupo havis komunajn programojn kun alilandaj esperantistaj gimnazianoj, kiujn gvidis Carola kaj kiuj nomiĝis Eŭropaj amikeco-Seminarioj. Antaŭ tiuj okazoj Carola ekzercis la lernantojn prepariĝi en la lingvouzo.

La hejmo de Carola estis malnova lernejo. Tie ŝi aranĝis plurajn renkontiĝojn kaj por infanoj kaj lernejanoj kursojn/kursetojn. Ĉar en la konstruaĵo eblis tranokti eĉ por pluraj homoj, Carola gastigis turistajn eksterlandajn buskaravanojn, ofte esperantistajn. Ankaŭ esperantis-toj, kiuj faris preleg- aŭ aliajn vojaĝojn en Finnlando haltis en la suda Finnlando ĉe Carola.

Tra Skolta Esperanto-Ligo Carola disvastigis la scion pri Esperanto eĉ kiel ĝia prezidanto. En la loka gazeto oni povis legi rakontojn pri ekz.

Universalaj Kongresoj kaj multaj eksterlandaj gastoj.

Carola Antskog trapasis la mezan UEA/ILEI-ekzamenon en 1999 kaj la KER-ekzamenon je C1-nivelo (skribe en Finnlando kaj parole en Rejkjaviko) en 2013. Ŝi estis membro de kelkaj lokaj Esperanto-societoj.

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj kondolencas al Anna kaj ŝia frato kune kun la familioj.

*Sylvia Hämäläinen*

## Salon Esperantoseuralta

*Näin siinä sitten kävi. Esperantisteille tuli suru-uutinen: Carola Antskogia ei enää ole. Hänet kutsuttiin elämästä rajan taa. Tapasin Carolan viimeisen kerran Salon sairaalassa. Puhe ei enää luontunut. Hän murehti: "minä olen huono puheenjohtaja." Carola kirjoitti: Matti ja nosti peukalon. Samoin hän nosti peukalon, kun Anna kysyi voimmeko mennä Perniön hoivakotiin Eeroa tapaamaan. Carolan hautajaisissa Kemiössä sain uuden suruviestin. Eero Saari on kaksi päivää sitten kuollut. Salon Esperantoseura on kiitollinen: Carola oli viimevuodesta puheenjohtajamme ja Eero ei koskaan unohtanut esperanto-asiaa.*

*Matti Wallius*

## De Esperanto-societo en Turku

Mi ne memoras kiam ni renkontiĝis kun Carola la unuan fojon. Annan mi vidis unue en FEJO-renkonto en Helsinki-regiono kaj baldaŭ evidentiĝis ke ŝi lernis la internacian lingvon kune kun sia patrino. Ambaŭ fariĝis baldaŭ aktivaj membroj de pluraj membroasocioj de EAF. Estis nature, ke ili ofte vizitis ankaŭ en aranĝoj de la Esperanto-societo en Turku. Laŭ peto Carola estis ĉiam preta instrui en niaj kursoj kaj tiel ni kelkfoje invitis ŝin ekzemple al kursoj en Aurala. La lastan fojon ni vidis nin okaze de la 100-a UK en Lille: kiam la karavana buso venis el Kimito, Carola jam sidis tie. Post la vojaĝo ni adiaŭis ĉe mia hejmdomo kaj



la buso kun Carola, Anna kaj Sigrid ekveturis reen al Kimito. La plej lastaj kontaktoj kun ŝi okazis pere de retroŝtoj kaj de telefonaj tekstmesaĝoj: ŝi afable dankis pro nia salutkarto kaj petis ke ni prizorgu ke Salo-anoj venu al la jula festeto. Dankon pro ĉio, kara amikino.

*Tiina Oittinen*

En la funebra ceremonio la pastro difinis Carola kiel ”bygdens dotter”, filino de la hejmgregiono. Tia ŝi estis. Ŝiaj radikoj estis en la hejma tero kaj gepatra lingvo, siajn branĉojn ŝi etendis al tutmondo kaj Esperanto, montrante al ni kion aspiri, kio valora estas.

*Tuomo Grundström*

## La letero revenis post 50 jaroj

Kelkfoje etaj surprizoj povas esti tre agrablaj. Meze en decembro 2015 mi ricevis el Svislando mian aerograman leteron kun dato de 15.12.1961, adresitan al *István Mórocz*. Li estas kapabla kaj talenta arkivisto kaj grafikisto. Antaŭ duonjarcento nia kunlaboro sukcese evoluis.

István instruis en *Somero* dum la lernojaro 1960–1961. *Juhani Vilkki* varbis lin somere 1960 en Bruselo. Rektoro Joel Vilkki ricevis tre bonan kaj entuziasmigan pedagogon. Paroliga metodo perfekte taŭgis por liaj celoj. La infanoj rapide komencis esprimi sin dum la konversaciaj dialogoj en la klasĉambroj. En iu paŭzo regis forta vento sur la lerneja korto. Knabineto diris: ”Instruisto, viaj haroj dancas.” Bela ekzemplo pri krea esprimkapablo.

*Julio Baghy*, konata budapeŝta poeto, gvidis la komencajn stud-fazojn de la juna lernanto István. Sekvis mirinda mondo de poeziaj perloj. Post la tumulta jaro 1956 en Hungario nia konata aven-

turema junulo trovis por si novan hejmolandon en Svislando. Sekvis invito al Kanado por labori kiel kunlaboranto en libroeldonejo esperantista. Sapiro al Eŭropo venkis kaj reveno okazis.

Tra pligrandigilo mi atente kontrolis mian propran tekston. Erarojn mi ne trovis. Post dujara studado jam tute kontentige mi uzis la Zamenhofan lingvon. Por atingi tion, ne estas miaj meritoj. Ĉefan rolon ludas la lingvo mem, ĝiaj reguleco kaj elasteco. Veran ĝojon mi havas pro la genia kreaĵo de doktoro Zamenhof.

Fine indas mencii, ke nune István kaj mi tre ofte ”skajpas” babilante pri ĉio ebla sub la suno. Tia ekzercado donas al ni kvazaŭ gepatran lingvoscion en Esperanto. Simple dirite, ni sentas nin dulingvanoj. Tiaj spertoj sincere ĝojigas nin. La lango moviĝas en la buŝo kaj sur ĝi vortoj bolas. Tiel diris niaj finnaj pragepatroj.

*Jorma Ahomäki*

### Kutsu Suomen opettajien esperantoyhdistyksen vuosikokoukseen – Kunvoko al la jarkunsido de ELFI

*Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n (ELFI) sääntömääräinen vuosikokous pidetään 12. maaliskuuta 2016 klo 10.30 alkaen Kumppanuustalossa (osoite: Kirjastokatu 1, Hämeenlinna). Käsitellään vuosikokoukselle kuuluvat asiat. – Kaikki jäsenet tervetuloa!*

Laŭstatuta jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) okazos sabaton la 12-an de marto 2016 je la 10.30 en *Kumppanuustalo* (adreso: Kirjastokatu 1, Hämeenlinna). Estos traktataj laŭstatutaj jarkunsidaj aferoj. – Ĉiuj membroj estas bonvenaj!

*Hallitus – La estraro*

# Librokolekto de ELFI

Antaŭ pluraj jardekoj Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) ricevis de *Irja Klemola* librokolekton por prezenti Esperanton en diversaj okazoj. Siatempe ĝi estis uzata plurloke. Poste la libroj malnoviĝis kaj forgesiĝis en sia deponejo, kiu estis la hejmo de *Carola Antskog*. Malfeliĉe la domo forbrulis antaŭ kristnasko 2014, kaj niaj libroj kune kun la tuto. El la assekuro ni ricevis sufiĉan sumon por havigi nuntempajn librojn.

La librokolekto estos prezentata dum la Vintraj Tagoj en Hämeenlinna. La kolekto kuŝas ĉe la kasisto de ELFI, *Paula Niinikorpi* (kontaktscioj sur la paĝo 2). Kiu ajn povas mendi la serion de ŝi. Vi ne devas esti membro de ELFI. La sendokostoj dividiĝos laŭ interkonsento.





La librokolekto konsistas el 23 libroj kaj du serioj da sonaĵoj. Nia kolekto enhavas lernolibrojn por infanoj kaj (plen)kreskuloj, diversajn vortarojn (ekz. 5-lingva), libron originale verkitan en tri lingvoj (Putin), finnajn verkojn, bildstriojn, kantlibrojn kaj E-historion. Ĉiu povas libere aldoni proprajn librojn, gazetojn kaj objektojn al sia ekspozicio.

Kompreneble nuntempe libroj ne estas la sola respondo al la demando kiel lerni Esperanton, sed multaj homoj pli volonte uzas libron por studi ion ol komputilon aŭ iun alian modernan ilon. Pere de libroj oni bone prezentas kia la internacia lingvo estas.

*Sylvia Hämäläinen, prez. de ELFI*

## Librokolekto de ELFI 6.12.2015

	Alaŭdo (kantlibro)
Allée Beatrice, Kováts Katalin	Poŝamiko
Amery Heather	Mil unuaj vortoj en Esperanto
Chaves Sylla	Originala Esperanta bildvortaro
Gosciny	Asteriks kaj Kleopatra
Hämäläinen Sylvia	Ni semas kaj semas... (90-jara historio de ELFI)
Jansson Tove	Muminvalo
Lönnrot Elias	Kalevala
Kivi Aleksis	Sep fratoj
Kniivilä Kalle	Homoj de Putin
Kniivilä Kalle	Putins folk
Kniivilä Kalle	Putinin väkeä
	Kune ni kantas (80-a UK)
MacGill Stefan	Okulo 1
MacGill Stefan	Okulo 1 Gvidilo
Marček Stano, Grundström Tuomo	Esperanto mutkattomasti
Nordenstorm Leif, Lörmemark Christer, Korženkov Aleksandr, Grundström Tuomo	Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli
SAT	PIV Plena Ilustrita Vortaro
Pluhaf Zdeněk, Westermayer Manfred, Fettes Christopher, Skilling Raymond	Ekoturisma vortaro 5-lingva
Röntynen Erkki	Proverbaro – Nia Komuna Heredaĵo
Salovaara Eija	Kie boacoj vagadas
Vilkki, Joel	Suomi-esperanto-suomi taskusanakirja
Wells John, Kivekäs Silja	Jen nia mondo 1
Wells John	Jen nia mondo 1 (3 kd)
Wells John, Kivekäs Silja	Jen nia mondo 2
Wells John	Jen nia mondo 2 (3 kd)



# Esperanton kesäkurssi Iisalmessa – Somera kurso en Iisalmi 14.–17.7.2016



Kursejo de la somera kurso.

Venontsomere ni vidos nin en Iisalmi, ĉu ne? La preparoj por la Somera kurso 14.–17.7. antaŭeniras kaj koncerne la instruadon (Gražina kaj Tiina) kaj la libertempajn aktivadojn (Onni kaj aliaj en Iisalmi). Ni spertu kune belegajn, informajn kaj utilajn tagojn en somera Finnlando. Rezervu jam la tempon kaj memoru rekomendi la kurson al viaj konatoj, speciale al junaj, kiuj povos peti vojaĝstipendion.

Kursokotizoj (13.–17.7.): 55 € po tago (inkl. ankaŭ tranoktakton en amasloĝejo aŭ en tendo ĉe la bieno de Onni) aŭ 40 € po tago (sen tranoktado, vi aranĝos ĝin mem ekzemple en hotele en Iisalmi).

La kursokotizoj inkluzivas instruadon, manĝaĵojn, kafeojn kaj transportojn el Iisalmi kaj reen kaj la plej grandan parton de la ekskursaj kostoj. La kotizon vi pagos kontante surloke, informiĝu ĉe Tiina, la sekretario de EAF.

Aliĝoj al la sekretario de EAF: Tiina Oittinen, [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), tel. +358-50-5494709. Informojn pri kursopraktikaĵoj donas ankaŭ Onni Kauppinen, tel. +358 500-813530. En la aprila gazeto aperos la detala kursoprogra-

mo. Sekvu ankaŭ informojn en niaj retpaĝoj!

*Ensi kesänä nähdään kaikki Iisalmen kesäkursilla! Kurssin järjestelyt ovat käynnissä niin opetuksen kuin vapaa-ajan ohjelman suhteen. Opetuksen hoitavat Gražina ja Tiina, vapaa-ajasta huolehtivat Onni ja muut iisalmelaiset. Kurssipäivistä tulee varmasti unohtumaton elämys Savon sydämessä. Varaa nyt jo aika ja muista suositella kurssia tuttavillesi, erityisesti nuorille, joilla on mahdollisuus saada matka-apurahaa (ks. Esperanto-lehti 5/2015, sivu 5).*

*Kurssipaikka Nerkonniemen kylätalo sijaitsee lähellä Iisalmen Esperantokerhon puheenjohtajan Onni Kauppisen maatilaa. Kurssimaksu on 55 €/vuorokausi, jos yöpyy Onnin maatilalla yhteismajoituksessa (osin teltassa). Jos valitset muun yöpymispaikan (esim. hotellin Iisalmessa) kurssimaksu on 40 €/vrk ja lisäksi maksat itse majoituskulut. Kumpaankin kurssimaksuun kuuluu opetus, ruokailut, retkikulut pääosin sekä kuljetukset Iisalmesta kurssipaikalle ja takaisin.*

*Ilmoittautumiset Suomen Esperantoliiton sihteerille: Tiina Oittinen, [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), tel. +358-50-5494709. Lisätietoja kurssista antaa myös Onni Kauppinen, tel. +358 500-813530. Kurssimaksu maksetaan joko käteisellä paikan päällä tai EAF:n tilille (kysy viitenumero sihteeriltä). Kurssiohjelma julkaistaan liiton nettisivuilla sekä lehden huhtikuun numerossa.*

Bonvenon al Iisalmi! Tervetuloa Iisalmeen!

Onni, Gražina kaj Tiina

## Donaco de la paŝtista knabineto

Eta kaj senhelpa kuŝis Jesueto en la stalo sur sia aĉa pajlaĵo gardata de bovoj, ŝafoj kaj azenoj. Maria, lia patrino, maldormis apud la kripo. Feliĉa rideto pliheligis ŝian belan vizaĝon. Jozefo interfingrumis siajn brunajn, krudajn manojn, alrigardante la bebeton kun profunda respekto.

Noktiĝis jam, ŝtormo ululis ekstere, vipante ĉion per malseka neĝo. Ofte nubo kaŝis la grandan kristnaskan stelon, sed ĝia brilo tiom fortis, ke eĉ tra la nubo ĝi lumigis la pejzaĝon kaj preskaŭ blindige enradiis en la stalon, inter kies muroj la ĉarma sekreto kaŝiĝis.

De l'fora Oriento estis alvenintaj tri saĝaj reĝoj, la magoj. Vestitaj en veluro kaj oraĵoj, ornamitaj de juveloj kaj gemoj, ili surgenuiĝis antaŭ la malgranda brilokula infano, kiu al ili etendadis siajn delikatajn manetojn. La magoj al li portis oron por montri al li, la Reĝo de Reĝoj, sian humilecon. Ili donacis sanktan fumon, incenson, kiu bonodorigis la tutan sombran stalon, ili surplankigis mirhon apud la kripolito por adori lin.

De la paŝtejo venis ankaŭ ŝafistoj por adori la sanktan infaneton. Ĉiu el ili kunportis donacon, ŝafidon, kapridon aŭ kolombon, lerte ellaboritan bovinkornon uzeblan kiel trinkujon. La plej maljuna, blankbarba aĝulo, donacis sian plej karan trezoron, el ligno tajlitan kalendaron, kiu montris kaj la tagojn kaj la monatojn. Lia juna forta kamarado elprenis el sia ŝafista dorsosako tintilon, kiun li mem en sia libertempo gracie tajlis kaj ornamis per sia tranĉilo.

Malantaŭ la aliaj staris ĉifona ŝafistineto timida. Ŝi stariĝis sur siajn piedfingrojn por vidi la novnaskiton, sed la larĝaj ŝultroj de la virŝafistoj malebligis vidi la kripon kaj la knabineto devis kliniĝi por elrigardi el inter la kruroj de la viroj. Tiel ŝi povis ekvidi sur la pajlaĵo infaneton, kies okuloj ŝin rigardis tiel milde kaj mirakle, ke plena de pia admiro ŝi surgenuiĝis.

Malgaje ŝi okulumis al la donacoj de la aliaj

– kun plezuro ankaŭ ŝi ja donus al la miraklo-infano iun donaceton et-etan kiel signon de sia amo. Sed ŝi estis nur malriĉa ŝafistineto, malplenaj estis ŝiaj magraj manoj harditaj de la laboro. Nenion ŝi posedis, nenion povis donaci.

Sed alte en la noktblua ĉielo staris la anĝelo Gabrielo. Li ekvidis la malĝojon de la knabineto kaj profunde kompatis ŝin. Li surteriĝis, enflugis la stalaĉon por demandi la kialon de la malĝojo de la ŝafistineto.

”Ho,” ŝi respondis, ”mi ŝatus donaci ion al enkripa infaneto, sed mi havas nenion por fordoni.”

”Kion vi ŝatus doni al li?” demandis la milda anĝelvoĉo.

”Reĝoj kaj ŝafistoj jam donacis al infano Jesuo tiom da belaĵoj ke certe nenio mankos al li,” la malgaja knabineto suspiris.

”Ĉu ili nenion forgesis?” pludemandis la anĝelo. ”Pensu!”

Rapide la ŝafistineto respondis: ”Ho, se mi povus doni al li rozojn, blankajn aŭ ruĝajn. La kara bebeto ja ne ricevis eĉ unu floron. Sed ja estas tute neeble, ekstere froste vintras, la flora printempo foras.”

Tiam la anĝelo prenis la knabineton je la mano. Ili kune elstaliĝis por iri al la neĝkovrita herbejo, kaj mirakla lumo heligis la montojn kaj paŝtejojn ĉirkaŭe. El la grundo elpuŝiĝis verdaj tigoj kun floretoj, ĉarmaj strange belaj rozoj. Ties diafanaj petaloj arĝente blankis kiel la plej fajna alabastro kaj centre en la floro brilis ora kruco. Kun granda ĝojo la malriĉa ŝafistineto plenigis sian antaŭtukon per la belegaj rozoj kaj tion farinte rapide transkuris la paŝtejon por reiri en la stalon. Ĉe la kripo ŝi surŝutis la infaneton per la bonodora flararo. Post tio ŝi surgenuiĝis adorante la Kristo-infanon kun koro plena de tenera amo.

Ŝi diris: ”Nun mi scias, ke venis la Savonto. Ĉiela anĝelo alparolis min kaj mi vidis la mag-

ojn surgenuiĝi ĉe la kripo. Kaj en la vintra nokto mi vidis rozojn ekflori je lia gloro.

*FINO*

### Faktoj pri la "kristnaska rozo", heleboro, kiu tute ne estas rozo

La planto heleboro venas de la regiono inter Kaŭkazio kaj Centra Eŭropo. Romaj stoikaj filozofoj kredis, ke heleboro donas saĝon. Kiel floringva simbolo ĝi signifas liberiĝon de angoro. La vero estas, ke la tuta planto kaj ties radikoj tre venenas. Oni neniukaze manĝu ĝin,

kvankam ĝi iam estis uzata kiel medikamento.

Unu rakonto diras, ke kiam soldatoj de Delfo sieĝis la urbon Kirho, la urbanoj ĵetis en la ĉirkaŭfosajon heleborojn kun ties radikoj kaj floroj. Kiam la atakontoj tuŝis la akvon, ili malsaniĝis kaj decidis retiriĝi.

*Saliko*

---

*La legendon verkis la finna fabelistino kaj junularverkistino Anni Swan (1875–1958), finne trovebla en google per la vortoj Anni Swan: Legendoj, Paimentytön lahja*



## Ekzercado por KER-ekzamenoj

En la jaroj 2012 kaj 2013 ELFI aranĝis en Helsinko oficialajn ekzamenojn pri kono de Esperanto, la t.n. KER-ekzamenojn, kaj 20 personoj trapasis ilin. Eble iu el vi jam pensis, ke nun estas mia

vico fari same. La 4-a de junio estas Tutmonda Skriba Ekzamentago (TSE). La subskribinto devas scii plej laste la 25-an de februaro ĉu troviĝas 5 kandidatoj, kio estas la minimumo. Ni ankoraŭ ne planis kie aranĝi tion, se estas intereso. Se TSE ne okazos en Finnlando, oni povas ekzameniĝi ekz. dum UK en Nitro.

Se vi tamen volas fari ekzamenon, sed ne ankoraŭ ĉijare sed venontjare, lasu min scii ankaŭ tion ĝis 25.2. Ni planas iun sabaton ĉiprintempe aranĝi kunvenon por kune konatiĝi kun samtipaj taskoj, kiuj estas en la ekzameno. En ĝi povas partopreni kiu ajn, kiu havas la deziron fari la ekzamenon, ĉijare aŭ sekvontjare. Ambaŭ gvidantoj, *Paula Niinikorpi* kaj mi, havas kompletan atestilon pri la plej alta KER-ekzameno C1.

Pensu kaj informu pri via intenco.

*Sylvia Hämäläinen*  
sylvia.h@kolumbus.fi

## KELI invitas vin partopreni

Kristana Esperantista Ligo Internacia invitas Vin partopreni la 66-an kongreson de KELI, kiu okazos en *Bratislava*, la ĉefurbo de Slovakio, en la tagoj 16.–23.7.2016. Se Vi volas ĝui amikan kristanan medion en la nova kaj sufiĉe komforta teologia fakultato, tuj aliĝu!! Ankaŭ tiuj, kiuj partoprenos la UK-on en Nitro, povas plilongigi sian restadon en Slovakio kaj ekko-

ni la belan urbon Bratislava. Nitro estas bone atingebla!

La programo estos tre varia. Du diservoj, ĉiutagaj preĝoj, kantado, diversaj prelegoj, koncertoj, 2 duontagaj kaj unu tuttaga ekskursoj.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn sendas *Pavel Polnický*, *Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady*, retpoŝte: *polnickypavel@seznam.cz*

## Forpasis Roland Lindblom (1931–2016)

**R**oland Lindblom, unu el la plej elstaraj aktivuloj de la sveda Esperantomovado, forpasis la 17-an de januaro, du tagojn antaŭ sia 85-jariĝo. Li naskiĝis la 19-an de januaro 1931. Lindblom lernis Esperanton 16-jara kaj jam post ses monatoj li gvidis kurson de la nove lernita lingvo. Li fondis aŭ instigis fondon de pluraj Esperanto-klubo, unuafoje en 1949. En 1950 li fariĝis prezidanto de la distrikto de Sveda Esperanto-Federacio en Okcidenta Svedio. En 1958 li kunfondis Svedan Esperantistan Junularan Unuiĝon kaj fariĝis ĝia vicprezidanto. Lia partopreno en la gvidado de la landa asocio komenciĝis en 1972, kiam li estis petita helpi la estraron de SEF kiel protokolanto. En 1974 li fariĝis vicestrarano de SEF, en 1976 estrarano kaj en 1978 prezidanto, kiun taskon li plenumis ĝis 1985.

Lindblom membriĝis en UEA en 1953, fariĝis vicdelegito en 1957 kaj delegito en 1970. Komitatano de UEA li estis 1978–1986, 1992–2001 kaj 2007–2010, estrarano pri la landa agado kaj kongresoj 1983–1986 kaj kunordiganto de la Elekta Komisiono 1999–2002. Li estis prezidanto de LKK de du UK-oj: la 65-a en Stokholmo (1980) kaj la 88-a en Gotenburgo (2003). La Alta Protektanto de la 65-a UK estis la parlamentestro *In-*

*gemund Bengtsson*, kiun li persone konis kaj kies apogon al Esperanto li povis ofte utiligi. En 1985 li persvadis Bengtsson ĉeesti la inaŭguron de la SEF-kongreso en *Helsingborg*. En la Jubilea Jaro 1987 Bengtsson disponigis la parlamentejon por la sveda kongreso, sed pro lia malsaniĝo ĉeestis parlamentano *Daniel Tarschys*, posta ĝenerala sekretario de la Konsilio de Eŭropo. Lindblom reprezentis UEA en du Unesko-konferencoj en Stokholmo: en 1978 pri informado kaj en 1998 pri kulturo. En 1998 li reprezentis UEA ĉe la konferenco de ISO en Stokholmo. En 2013 UEA elektis Roland Lindblom Honora Membro.

[GK 602]

### Al Roland

”Via koro ĉi tie restas. Ĉiam proksima al ni ĝi estas. Ni atingas ĝin, kvankam la tero estus senkanta. Kiam vi foriris, ni aŭdas nur flustradon de marborda ondato. Ni kredas pli ol supozas kaj tie vi nin salutas.”

Dankante pro niaj neforgeseblaj renkontoj en *Åbo*, *Stockholm*, *Mariehamn* kaj *Haninge* mi direktas mian preĝon al la Ĉielo.

*Jorma en Åbo, Finnlando*

## Aliĝu al PRINTEMPaS kun rabato – aliĝu al KER-ekzameno

*Jannick Huet-Schumann* (estrino) kaj *Christophe Chazarein* (ekzamen-responsulo) kore atendas vin en kastelo *Gresillon* (Francio) de la 8-a ĝis la 16-a de aprilo 2016 por la 6-a PRINTEMPaS kun 3 kursoj: por komencantoj kun *Marion*, por prepari la ekzamenon B1 kun *Christophe*, kun *Radojica* (ILEI-estrarano) por B2 kaj C1.

Vidu [gresillon.org/printempo](http://gresillon.org/printempo) kaj aliĝu nun por havi rabaton: [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho) Kiel kutime vi ege plibonigos vian parolkapblon en varma etoso en la bela printempa naturo de nia granda parko kaj plie vi povos malstreĉigi kun la ĉarma helpo de *Lise* post bongusta tagmanĝo de nia kuiristo *Frederic*.

Aliaj aranĝoj:

**20.–24. aprilo:** Korusa renkonto de *Interkant'* kaj verkadaliero *Krajon'*-Ankro, rete: [gresillon.org/koruso](http://gresillon.org/koruso)

**12.–17. junio:** La Luaro laŭ la vortoj, turisma semajno laŭ verkistoj, rete: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

**4.–15. julio:** Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto, rete: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

**6.–13. aŭgusto:** SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO, rete: [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

**21.–28. aŭgusto:** Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj, rete: [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33-2.41.89.10.34, rete [gresillon.org/kontakto](http://gresillon.org/kontakto)

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.pietilainen@helsinki.fi](mailto:jukka.pietilainen@helsinki.fi) (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☒ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 ☒ [kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi), [www.esperanto.fi/jyväskylä](http://www.esperanto.fi/jyväskylä)
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☒ [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu) [aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☒ [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere) (*Tapani Aarne: [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)*) ☎ 050 5245 823)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☒ [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi) ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☒ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☒ [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi).

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitosta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

# 2016

Nro	Limdato	Aperas
2/2016	31.3.	en aprilo
3/2016	31.5.	en junio
4/2016	1.9.	en septembro
5/2016	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoi

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:      Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 €      1/1 sivu/paĝo 50 €

1/2 sivu/paĝo 60 €      1/2 sivu/paĝo 30 €

1/4 sivu/paĝo 40 €      1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo:  
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,  
00530 Helsinki.

A decorative border with floral motifs surrounds the central text area.

## Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

- 12.–13.3..... Vintraj Tagoj en *Hämeenlinna*  
5.–8.5..... Sveda Esperanto-Kongreso, *Gdańsk*, Pollando  
13.–16.5..... La 93-a Germana Esperanto-Kongreso  
en *München*, Germanio  
30.6.–4.7..... La 75-a Hispana Esperanto-Kongreso en *Herrera  
del Duque*, Hispanio  
2.–10.7..... La 52-a BET en *Birštonas*, Litovio  
14.–17.7..... Somera kurso en *Iisalmi*  
16.–23.7..... KELI-kongreso en *Bratislava*, Slovakio  
16.–23.7..... La 72-a IJK en *Wrocław*, Pollando  
16.–23.7..... La 89-a SAT-kongreso en *Herzberg*, Germanio  
23.–30.7..... La 101-a UK en *Nitra*, Slovakio  
30.7.–6.8..... ILEI-konferenco en *Nyíregyháza*, Hungario  
20.–27.8..... La 83-a Itala Kongreso en *Frascati* ĉe Romo, Italio

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Aineisto 31.3.2016 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 31.3.2016 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).